

Terminara Kuriero

TeKu 113

Aprilo 2001

Komunikilo de Terminara Sekcio en Faka Komisiono de IFEF

Gvidanto de Faka Komisiono:


Jan Uldal Niemann, Hovedvagsstræde 9E, 1 DK-3000 Helsingør

Telefono: +45 49 26 13 19 Retadreso: esperanto@mail.dk


Sekretario de Terminara Sekcio:

D-ro Heinz Hoffmann, Finstere Gasse 2 DE-01445 Radebeul

Telefono: +49 351 8385877 Retadreso: IFEF.B90GR-mei@t-online.de



bildo 1 (RailLexic 05242)



bildo 2
(RailLexic 05241)

laŭ PIV- kaj franca difinoj

tendrolokomotivo

sentendra lokomotivo

laŭ germana difino

lokomotivo kun aparta tendro

tendrolokomotivo (sen aparta tendro)

bildo 1

bildo 2

La ĉeĥa faklingvo klare respondas al la PIV-difino: (Aparta) tendro nomiĝas *tendr*; surlokomotiva ujo por brulmaterialo kaj akvo nomiĝas *vana*. Jen la nacilingvaj terminoj por la lokomotivoj:

	ĉeĥa	franca	germana
bildo 1	tendrovka	locomotive à tender séparé	Schleppentenderlokomotive
bildo 2	vanovka	locomotive-tender	Tenderlokomotive

Ankaŭ ĉi tie montriĝas, ke la francaj RailLexic-terminoj respondas al la germana difino, do kontraŭas al la propra normigita difino.

Kiun tendro-difinon havas via nacia faklingvo?

5. Restas la serĉo de taŭgaj Esperanto-terminoj laŭ TeKu 112, paĝoj 7/8 por
- vagono, kiu je unu vagonekstremaĵo havas normalan kuplilon, je alia firman kuplilon aŭ artikon (proponoj: *komencvagono*, *finvagono*, *frontvagono*, *kapvagono*) kaj
 - vagono, kiu je ambaŭ vagonekstremaĵoj havas firman kuplilon aŭ artikon (proponoj: *mezvagono*, *intervagono*).

Bonvolu kunporti TeKu 112 kaj 113 al Tábor!

Interesan pripensadon kaj bonan vojaĝon al la kongreso amike deziras

Heinz Hoffmann.

Aperis testversio de „RailLexic 3.0“

Ĉiuj terminologie kunagantaj fervojaj „entreprenoj“ ankaŭ IFEF ricevis kompaktan diskedon (CD-ROM) kun testversio 2/01 pri la tria eldono de la terminologia datumbanko de UIC. Tiu eldono nun nomiĝas „RailLexic 3.0“.

Menuo-lingvoj estas nur la angla, franca kaj germana, sed la terminoj enestas en jenaj 20 lingvoj (eĉ 2 pli ol laŭ informo en TeKu 111):

angla, ĉeĥa, dana, Esperanto, finna, franca, germana, hispana, hungara, itala, japana, nederlanda, norvega, pola, portugala, rumana, rusa, serba, slovaka, sveda.

Kontrolo konfirmis, ke ĉiuj novaj Esperanto-terminoj ĝis numero 12689 kaj ĉiuj korektoj laŭ TeKu 108 (aŭgusto 1999) troviĝas en tiu tria eldono. Tamen en kelkaj naciaj lingvoj estas tradukitaj ne ĉiuj terminoj.

Al elektita termino estas indikeblaj 1 - 3 kodoj por subfakoj. La unua estas la ĉeĥa. Ekzistas diversaj serĉmetodoj. Por alfabetaj serĉoj eblas elekti ĉiun lingvon kiel fontolingvon, celolingvon 1 aŭ celolingvon 2. Aliaj metodoj estas serĉo laŭ la ŝlosilnumero kaj serĉo laŭ kompleksoj. Aldonaj informoj estas aperigeblaj, ekzemple difino, kunteksto, terminfonto, difinfonto, registrodato, korekto dato.

La testfazo baldaŭ finiĝos. En Tábor verŝajne estos donataj pli da informoj, kiel uzi la datumbankon.

Dua laborkunsido MT40 ĉe Internacia Fervojunio (UIC)

9-an de januaro 2001 en Parizo estis intense traktata sistemigo de bazaj veturilnocioj. Komparo inter la franca normo NF F 01-300 (majo 1980) kaj la germana normo DIN 25003 (vidu en TeKu 112) instigis malgrandigi la ĝis nun konceptitajn nociokompleksojn, kaj sekve pliigi ties nombron. Ambaŭ normigitaj nociosistemoj estas tre diferencaj: La franca estas pli komplika, ĉar enhavas por multaj specialaj subnocioj tute memstarajn nomojn. Kelkaj detaloj estas menciataj en la sekvaj taskoj por diskutado.



Legu vian TeKu atente !

La respondoj al la TeKu-112-demandoj pri nociostrukturoj en naciaj faklingvoj montris similecon ĝis egalecon inter la ĉeĥa, dana, germana, hungara, kroata, rumana, serba, slovena kaj slovaka, sed grandpartan kontraŭecon al la franca strukturo. Koncerne aliajn normojn pri rekondukaj veturiloj, Jaroslav David menciis la ĉeĥoslovakajn normojn ON 280001 el 1980; Emil Tudorache informis pri plano, eldoni rumanajn normojn fine de nuna jaro.

La laboro bone progresas kaj alportas interesajn taskojn por nia sekcio.

Terminoj diskutendaj en Tábor

1. La franca normo NF F 01-300 koncernas fervojajn veturilojn, kies funkcio estas transportado (de pasaĝeroj, kargoj kaj poŝtaĵoj) mem, aŭ kontribuo al la transportado. Tiajn veturilojn oni dividas en 2 bazajn specojn.

- La termino **matériel moteur** (RailLexic 05498) koncernas supernocion pri ĉiuj trakciiloj (lokomotivoj, motorvagonoj) kaj tiuj veturiloj sen propulsinstalaĵo, kiuj estas specialeigitaj kun trakciiloj (tendroj, senmotoraj vagonoj de motorvagonaroj).
- La termino **matériel remorqué** (RailLexic 05499) koncernas ĉiujn vagonojn por lokomotivtrakcio.

Tiu divido estas ne nur franca specialaĵo, sed ankaŭ bazo de la internacia UIC-numersistemo: Ĉiu internacie cirkulebla vagono de *matériel remorqué* havu 12-ciferan numeron laŭ jena ordo:

00 00 000000-0

Ciferoj 1 - 2 informas pri internacia uzeblo.

Ciferoj 3 - 4 informas pri la posedanta fervoja entrepreno.

Ciferoj 5 - 11 koncernas vagonospecojn kaj kurantan numeron.

Cifero 12 estas memkontroldigito.

Por veturiloj de *matériel moteur* ankoraŭ ne ekzistas devo por internacie unueca numbersistemo. Ĉe la fervojaj entreprenoj ekzistas diversaj strukturoj, pleje jena 7-cifera ordo:

000 000-0

La nuna Esperanto-termino sub 05498 „trakciiloj“ ne trafas la nocion de *matériel moteur*, ĉar la esprimo ne inkludas tendrojn kaj senmotorajn vagonojn de motorvagonaroj. Pripensante taŭgan terminon por *matériel moteur*, ni konsideru la sufiksojn *-um-* (PIV: *Sufikso sen difinita senco, uzata por derivi vortojn, kies rilato al la radiko estas malpreciza kaj ne esprimble per alia sufikso.*). Do, unua propono estas „trakciumaj veturiloj“.

La nuna Esperanto-termino sub 05499 „vagonoj“ ankaŭ ne trafas la nocion de *matériel remorqué*, ĉar al tiaj veturiloj ne apartenas vagonoj de motorvagonaroj. Tiukaze, unua propono estas „lokomotivtrakcia vagono“.

Aliaj proponoj estas dezirataj.

2. Por vagono de motorvagonaro ekzistas la germana termino *Triebzugwagen* (RailLexic 09895). Ĝi povas esti

- motorvagono,
- stirvagono (por motorvagono) aŭ
- vagono laŭ motorvagona tipo sen propuls- kaj stirinstalaĵoj.

Estas pripensinde, ĉu lasi la nunan Esperanto-terminon 09895 „vagono de motorvagonaro“, aŭ koncizigi ĝin helpe de la sufikso *-um-* al „motoruma vagono“, aŭ vortigi alian esprimon.

3. Jam en TeKu 112 sur paĝo 8 estas tuŝita la problemo „remorko“. Jen ripeto: Laŭ PIV, en ĝeneraluza lingvo „remorko 2“ estas veturilo, trenata de biciklo, de aŭtomobilo aŭ de tramo. Kvankam la vorto do ne estas speciala fervoja termino, ĝi troviĝas en RailLexic 07511 kiel „remorko (fervoja veturilo)“. Ĉar la radiko „remork-“ venas de la franca lingvo, gravas ties difino en la normo NF F 01-300. Tie ŝajnas esti paradokso, ke *remorque* ne apartenas al *matériel remorqué*, sed estas speco de *matériel moteur*. La termino *remorque* koncernas senmotoran vagonon de motorvagonaro. Oni dividas tiun veturilspecojn en la 2 subspecojn *remorque-pilote* kaj *remorque intermédiaire*. La termino *remorque-pilote* (RailLexic 07513) koncernas stirvagonon nur por motorvagono. Stirvagono por lokomotivo apartenas en Francio al *matériel remorqué* kaj nomiĝas *voiture-pilote* (RailLexic 09834).

La germana termino *Steuerwagen* (ankoraŭ sen aparta RailLexic-numero) koncernas ĝeneralan stirvagonon, egale ĉu por motorvagono aŭ por lokomotivo.

Vagono sen propuls- kaj stirinstalaĵoj, tamen laŭ tipo de motorvagono, nomiĝas france *remorque intermédiaire* (RailLexic 07514), germane *Beiwagen*.

Jen du proponoj por solvo en Esperanto:

RailLexic-numero	solvo 1	solvo 2
07511	remorko (fervoja veturilo)	senpropulsa motoruma vagono
nova numero	stirvagono	stirvagono
07513	stiroremorko	stirvagono (por motorvagono)
09834	stirvagono (por lokomotivo)	stirvagono (por lokomotivo)
07514	intera remorko	remorkvagono

4. **Kio estas tendro?** PIV difinas. *Specialforma vagono, kiu estas senpere alligita al vapormova lokomotivo, kaj en kiu troviĝas rezervo da karbo kaj akvo.* Ankaŭ en la franca normo NF F 01-300 troviĝas samsenca difino de *tender*. Kontraste al tio, en la franca versio de RailLexic estas listigitaj kaj *tender* (08733) kaj *tender séparé* (08736). El tio sekvas ankaŭ la du Esperanto-terminoj „tendro“ kaj „aparta tendro“. Tiu lasta nociosistemo egalas al la germana difino de *Tender*: **Ujo por rezervo da brulmaterialo kaj akvo,**

- aŭ kiel aparta tendro („Schleptender“) sur propra rulekipaĵo kaj alkuplita al vaporlokomotivo,
- aŭ instalita sur vaporlokomotivo mem.

El tiuj malegalaj difinoj estiĝas la demando, kiel nomi la du specojn de vaporlokomotivoj laŭ la bildoj 1 kaj 2: